Ulrich Matthias,

Eine-Welt-Hymne

Zu singen nach der Melodie der Ode an die Freude (bzw. Esperanto-Hymne)

Mauern, die die Menschheit teilen,
können überwindbar sein.
Unsre Heimat ist die Erde
und wir laden alle ein,

eine Welt zu bauen, in der
jeder seinen Nächsten liebt
und den Armen und den Schwachen
eine echte Chance gibt.

Denen auch, die heutzutage
Hunger leiden müssen, weil
viele Freiheit missverstehen
und behaupten, Geiz sei geil.

Menschenwürde, Menschenrechte
sind als Forderung gemeint,
dass Respekt vor allem Leben,
vor der Vielfalt uns vereint.

...

Ulrich Matthias,

Monda Himno

tradukita de Ulrich Matthias

Kantebla laŭ la melodio de la Eŭropa Himno (el la 9-a sinfonio de Beethoven)

Muroj de miljaroj baras
vojon al tutmonda bon'.
Inter ni landlimoj staras,
regas jen perfort', jen mon'.

Kelkaj vivas en mizero
ne eskapas el malriĉ',
kelkaj restas en sufero,
mankas ŝanĉo por feliĉ'.

Inter ni, la nekonatoj
forgesiĝas simpla ver':
ĉiuj homoj estas fratoj,
vivas sur la sama ter'.

Havas ni nur unu mondon,
sekve ĝin konservu ni,
formu familian rondon
por tutmonda harmoni'.

...

Menschenrechte, Menschenpflichten
sind untrennbar einerlei,
dass wir gut und menschlich handeln,
Friede auf der Erde sei.

Unrecht aus vergangnen Zeiten
sehn wir nur als Warnung an,
muss die Zukunft nicht belasten,
weil der Mensch verzeihen kann.

Eine Menschheit, eine Erde,
die es zu bewahren gilt,
was wir wohl erreichen können
wenn uns Einigkeit erfüllt.

Utopien werden Wahrheit,
wenn der Wunsch nach Frieden glüht,
dass die Menschen sich verstehen,
dass die ganze Erde blüht.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Ulrich Matthias, publikigita 2011-05-24.

Arg-1128-2278 (2015-02-28 12:14:07)

Pri la verkinto vidu la retejon `http://www.u-matthias.de/`.

Homa digno, homaj rajtoj
gvidu nin al nia cel',
homojn kun malsamaj trajtoj
ĉiu kun aparta bel'.

Homaj rajtoj, homaj devoj
regu sur la tersurfac'
por ke plenumiĝu revoj
por ke realiĝu pac'.

Por feliĉo en estonto
jen valoras nia pen'.
Amo estu nia fonto
por labori por kompren'.

Novaj sentoj, novaj ventoj
blovu nun tra land' kaj mar',
floru ĉiuj kontinentoj,
floru tuta la homar'.

Traduko de la Germana poemo "Eine-Welt-Hymne" de Ulrich Matthias en Esperanton de Ulrich Matthias en 2011-05-22.

Arg-1128-2279 (2015-02-28 12:14:29)

Pri la verkinto vidu la retejon `http://www.u-matthias.de/`.